

# Flandra **ESPERANTISTO**

**TIJDSCHRIFT VOOR ESPERANTO - ONDERWIJS EN -PROPAGANDA**

Orgaan van de **VLAAMSE ESPERANTISTENBOND, St. Klaradreef 59, BRUGGE**

Postrekening 2321.50 van V. E. B. Raapstr. 74, Gent

Verschiĝnt maandelĝks  
Drie en twintĝste jaarg.  
Nummer 9 (263)  
**SEPT. 1956**

LIDMAATSCHAPSGELDEN:  
Leden: 100 F (met inbegrip van het bondsorgaan)  
Steunleden: 150 F (idem)  
Inwonende leden: 25 F (met inbegrip van „De Esperantist“)  
Jongeren (onder de 21 jaar): 50 F

ABONNEMENTEN:  
Belĝiĝ: 75 fr.  
Ceteraj landoj: 75 bfr.  
Proefn.: 5 fr. (1 r.k.)

## La Karaktero de Esperanto

Sub la titolo „Niaj amikoj skribas” aperis en la antaŭa numero de N.E. traduko de artikolo de la konata Nederlanda verkisto Jan Greshoff. La aŭtoro, kvankam ne Esperantisto, tre klare vidas la esencon de la ekzistrajto de Internacia Lingvo, kaj li meritas nian admiron, ke li sukcesas tiel fundamente kaj elokvente esprimi sian opinion pri tio. Malgraŭ tio mi ŝatus fari kelkajn rimarkojn; estante jam multjara Esperantisto, mi ja povas fronti liajn vidpunktojn kun la praktiko.

Unue ni mallonge reprenu la fadecon de la rezonado.

„La lingvo estas la tuta popolo”, ĝi spiras la historion, la kulturon kaj teknikan nivelon de la popolo. Ĉiu kiu uzas alian lingvon ol sian propran, enspiras la spiriton de tiu popolo. La deviga uzo de alia lingvo, ankaŭ en la kazo de dulingvismo, samtempe devigas enspiri tiun nacian spiriton. Jen la nejustaĵo: *deviga* enspiro de alinacia spirito estas netolerebla al la spirita libereco kaj elvokas reziston. Nur kiam ĝi estas libervola, ĝi estas plejofte eĉ avide, akceptata.

Kontraŭe artefarita lingvo, ne ŝarĝita de nacia spirito, estas akceptebla al ĉiu.

Ĝis tie ĉi la aŭtoro.

Ni nun konsideru kelkajn aspektojn de pli proksime.

Ĝis nun la disvastiĝo de lingvoj iris laŭ „natura” vojo. Tio signifas ke ili gajnis terenon, perdis ĝin aŭ eĉ malaperis laŭ proceso ne diktita de inteligenta elekto. La determinaj faktoroj estas:

1. Natura kresko aŭ malkresko de popoloj. Tiel la indianaj kaj aŭstralianaj lingvoj iom post iom malaperas.

2. Milita subpremo.

3. Ekonomia influo. Pensu pri la franca lingvo en Bruselo, de la angla en Johannesburg, ankaŭ pri la malapero de dialektoj kaj malgrandaj lingvoinuloj en grandaj lingvoteritorioj.

4. Migrado. Landoj kiaj Usono, Kanado, Sudameriko, Aŭstralio, akceptas milionojn da enmigrantoj, kiuj post unu generacio alprenas la tiulandan lingvon.

Alispeca disvastiĝo de lingvo konsistas en la poioma penetro en aliajn lingvojn, pere de kultura kaj teknika influado. La itala lingvo donis multajn muzikajn terminojn, la angla donis amason da terminoj sur kampo de sportoj kaj tekniko. Alia grava penetro okazas pere de filmo kaj kantoj (ŝlageroj).

Ĉu iam artefarita lingvo havos seriozan ŝancon esti egalvalore uzata en la internacia trafiko? Ĉu iam la natura proceso de lingvo-evoluo estos trarompita kaj anstataŭata de konscia inteligenta elekto?

Ni konstata ke la ideo de dulingvismo jam gajnis terenon, kaj, kiel Greshoff prave konkludas, nur artefarita lingvo estos akceptebla al la inteligente pensanta homo, kiu konscias pri la fakto, ke neneŭtrala dua lingvo iam forbalaus aŭ almenaŭ grave difektus la propran lingvon. Sed kiom da homoj pensas tiel? Ĉu ni ne ĉiutage rimarkas ke la plimulto estas tute kontenta kun la natura proceso, kaj estus supozeble senproteste preta akcepti la anglan? Ĉu ni ne ĉiuj konas tiun seniluziĝon ke ni pensas batali por memkompreneble bona ideo, kaj tamen devas konstati ke nia ĉirkaŭaĵo, anstataŭ entusiasme adheri, restas senmova?

Tamen, ni ne estu tro pesimismaj. Unue ni fidu je la praveco de *nia* koncepto. Ni konstata ke ĉiam pli penetras la ideoj de justeco (malgraŭ ĉio!) utileco, normigo, celtrafeco, efikeco. Esperanto respondas al tiuj postuloj! Ĝi do havas la ŝancojn!

Alia aspekto (ne konsiderita de Greshoff) de la uzado de Esperanto kiel dua lingvo estas la jena. Ni nomas Esperanton lingvo. Tio implikas ke ĝi, same kiel naciaj lingvoj, havas spiriton, la spiriton de la Esperanta „popolo”, pri kiu ni tiel volonte par-

las. Sekvas el tio ke la uzanto de Esperanto ankaŭ enspiras la spiriton de tiu popolo. Kio do estas tiu spirito, tiu karaktero? Ĝin difini ne estas facile; unualoke ni tamen devus meti, miaopinie, la „internan ideon”, same malfacile difinebla nocio.

Sed apud tio estas aliaj aspektoj; ni ne fermu la okulojn antaŭ la mankoj, kiuj (ankoraŭ) ekzistas. Ĝi nur malsufiĉe penetris en la fakan lingvon kaj pro tio ne posedas jam kontentigan fakterminaron kaj idiomon. Tiu kiu dubas rigardu foje ĉirkaŭ si kaj klopodu traduki la nomojn de simplaj objektoj el la ĉiutaga vivo, trafiko, varoj, partoj de maŝinoj, manipulado ktp. Dekoj, eble centoj da vortoj ne estas troveblaj en la vortaroj, kaj devas ankoraŭ trovi sian definitivan formon per internacia kontakto.

La nuna uzanto de Esperanto devas ĝin akcepti kun ĉiuj tiuj karakter-ecoj, ankaŭ la mankoj.

Estas tamen mia opinio ke en tio elstaras la „interna ideo”, kaj ke ĉiu kiu iam uzis ĝin en internacia socio, „trinkis” iom da tiu „interna ideo”, kaj per tio, eble por la unua fojo en la vivo, komencis senti sin vera mondano. Nur tiu kiu mem spertis tion, scias la veran valoron.

dr W. J. Nijveld.

## ANONCO

S.ro Vago Imre, instruisto en PECS, Rudas Lasztóutca 21 Hungarlando, serĉas kontakton per korespondado kaj interŝanĝo de desegnaĵoj kun nederlanda lernejo. Esp.geinstruistoj bonvolu skribi al la nomita adreso.

## Novarangita broŝuro pri LUND

La sudsveda, universitata urbo Lund eldonis novarangitan broŝureton en Esperanto menciante la historion kaj la vidindaĵojn de la urbo. Kontraŭ 1 respondkupono oni povas ricevi ĝin ĉe Drättselkammaren, LUND, Svedujo.

# RAKONTO

## Fatalaj Okulvitroj

Gaja utopia rakonto de Pietro Bisvan

Per plena voĉpovo Cladgett, karnobulo en pompa fotelo esprimas sian indignon:

„Bankon mi gvidas, ne filantropian klubon. Ni ne zorgas pri knabetoj kaj iliaj revoj!”

La mizera junulo kun nomo Bookström antaŭ li donis la ŝulditan sumon kaj eliris senespere. Restis nur dek dolaroj. Li ja devos ĉesi medicinadon kaj akcepti la proponitan profesorecon de aplikata matematiko.

En filmoj kaj romanoj homon kiel Cladgett certe trafus briko de ruina domo aŭ ŝuldanto lin venenmortigus. Sed Cladgett male pli kaj pli prosperis kaj grasiĝis. Kaj li ŝajnis pli sekura ol la Roko de Gibraltaro.

Nur post dekkvin jaroj lin atingis la mano de l' sorto en formo de apendicito. Vespere li kriis pro doloro kaj mortotimo kaj malbenis la kuraciston kvazaŭ kulpus tiu.

D-ro Banza nenion diris, nur palpis la abdomenon, prenis sangoguton de la fingropinto en glaseton kaj eliris. Post horo, longa horo, li revenis. Cladgett ŝajnis legi mortkondamnon en la vizaĝo de la kuracisto. „Operacio!” li ekĝemis kiel vipita bubo, „mi ne operaciigas, mortos mi...” kaj kvietiginte: „Aŭdu, mi devos ĉeesti gravan kunsidon tri tagojn de nun. Mil dolarojn, se mi estos sana.”

Banza skuis la ŝultrojn. Nur bone, ke oni ne povas aĉeti sanon! Penseme li aliris restoracion kiam li subite sentis amikan dorsobaton.

„Kio estas, Doktoro? Vi aspektas malbon humora.”

Estis Bookström, nia konato, kaj post la manĝo, Banza rakontis pri la ĉagreniga dilemo kun tiu obstinema Cladgett minacanta lian karieron.

Bookström sidis longan tempon trankvile pensante.

„Estas ĝuste tio, kion mi serĉis”, li fine diris. „Ĉu vi volas aŭdi lecionon, Doktoro?”

„Vi memoras, kiel mi forlasis medicinon? Tamen ankaŭ matematiko interesas. Ankaŭ ĉi-afere mi devas ĝin apliki.

„Vi aŭdas multon pri la kvara Dimensio. Ne supozu, ke mi eksciis, kio ĝi estas. Sed mi ĝin aplikas same kiel mi utiligas lumon aŭ graviton sen koni ilin. — Do, vi prenos viajn mil dolarojn kaj ricevos mil aliajn por mi...”

„Konsentite, sed kiel...?”

„Nu, mi devas doni ekzemplon por klarigi. Imagu, ke vi kaj tiu ulo Cladgett estas dudimensiaj estaĵoj vivantaj sur la sama ebena. La sola maniero por vi, elpreni lian apendicon estas: tranĉi truon en lin. Kompreninte ĝis nun? — Sed, pensu, ke iu profesoro de aplikata matematiko vin levas iom, nur iomete super la ebenon. Vi tiukaze povus elpreni la ĉagrenajojn sen truo tra la cirkonferenco. Li, limigata sur la ebenon, nenion, vidos sed vi revenos apud lin, kun la apendico en via mano.”

„Brilanta argumentado, sed bedaŭrinde...”

„Ho, ĉu vi ne povas plupensi, ke mi konstruis lifton, kiu vin levas ordo al la aliaj tri laŭlonge de la kvara dimensio? Mi tion faris; vi povos kuraci la maliculon sen fari vundon en lin.”

D-ro Banza salte ekstaris. La homoj en la restoracio sin turnis.

„Venu kaj vidu!”

„Mi trovis specialiston”, la doktoro komencis, „kaj mi mem konvinkigis ke post du tagoj enlite kaj diete vi estos sana. Bedaŭrinde... (paŭzo) li postulas mil dolarojn kaj insistas, ke ili estas pagendaĵaj anticipe... kiel la miaj.”

Cladgett sin levis en la lito sed ĝeme refalis.

„Vi doktoroj estas bando de rabistoj” li lamentis.

Sed apendicito tro bone substrekas postulon. Kvin minutojn poste li jam estis survoje al la universitato kun vartistino kaj la doktoro, kiu havis du ĉekojn en la poŝo.

Bookström jam atendis. Sur lignan tablon ili levis la ŝarĝon tute ne dolĉan. Apud ĝi staris la „lifto”, simpla kiel ĉuj inventaĵoj grandiozaj kaj geniaj. Estas tri kunŝraŭbitaj latunaj reloj, unu orta al alia ĉiu kun cilindro kaj piŝto. Ĉe iu universala punkto kunvenis tri kurbaj stangoj, super kiuj firmiĝis platformo kun gumomato. Tio estis ĉio.

Kuŝante sur la malmola tablo, Cladgett povis aŭdi Bookström diri: „Kredeble vi ne insistas, mem fari ĝin. Mia ja ankoraŭ nun scias fortranĉi apendicon.” Sed la bankistan protestŝtormon sufokigis la kloroformmasko.

La profesoro isn starigis sur la gumomaton. Klik! Li estis for. Poste Cladgett ekĝemis kaj iom nenatura audiĝis la voĉo de Bookström: „Silentu, azeno!” Apenaŭ la sveninta vartistino reekkonsciigis, kiam klik.

tie li restaris kun la apendico ŝvelinta al la grandeco de dikfingro.

„Metu ĝin en formalinon por montri al li, kiel malsana li estis.

Vekante lin la postan tagon, oni povis vidi, ke Cladgett fartas multe pli bone. La febro estis for kaj du tagojn poste li ĉeestis la direktor kunsidon grumblante ke neniam li malsanis kaj malbenante la trompkuraciston.

Kaj Banza, kiu ne tuj sentis sin ofendita, ĉi tiam do iom ĉagrenis kaj decidis, ke antaŭ ol li lin vidos, la impertinentulo povos venigi afrikan sorĉiston. Sed li ja ne diferencis kun iu alia bona kuracisto kaj vokite, li estis „tiom azena” lin viziti.

Ĉi-foje Cladgett ne kuŝis en lito. En brakseĝo li frotis sian duonsferan abdomenon.

„Mi pensis min kuracita de apendicito”, li lamentis kaj la doktoro hokrite respondis: „Do ĝi estis apendicito, ĉu ne?” Kaj li aldonis „Certe vi denove havas mallakson.”

Mallakso estas kutima diagnozo de doktoroj, kiuj ne volas serĉi la verajn kaŭzojn. Nur fine, per multaj gutoj da ŝvito, Cladgett lin petegante persvadis uzi radio-skopon. Banza restis en rivelejo nedifineblan tempon, ĝis li elvenis kun cinabre ruĝa kapo.

„Kio estas?” kriis la grasulo.

„Bagatelo. Ni veturu al profesoro Bookström kaj post minuto vi denove fartos bone.”

Sed li malbone konis Cladgett.

„Mi ne volas revidi tiun ĉarlatanon. La roentgenradian bildon vi donu aŭ foriru!”

D-ro Banza donis ĝin. Tie, precize videbla estis paro de senmodaj pinzenez okulvitroj.

Terura timigo ekkaptis la grasulon traverŝitan de strangaj konvulsioj. Klakis supren kaj malsupren la makzelo, la vizaĝo irizis de mortopalo al viola bluo.

Banza ne malpli tima telefonis Bookström.

„Ho, kiel malfeliĉe. Mi venos!”

Ne kun la sama komplezo li estis akceptita. Cladgett ŝajnis kontentigita, rekonte ĵeti la pezan seĝon.

„Nu, nu, dolora? Ni vidu la roentgenogramon!”

La profesoro alterne rigaris la ŝvelantan duonsferon kaj la okulvitrojn sur la foto kvazaŭ mirante, ke tia malgrandaĵo ne trovas lokon tie.

„Vi malpura ŝtelisto, vi fripono, vi pagu kvindek mil dolarojn aŭ mi vin akuzos pro kompenso aŭ mi vin...”

„Ne tiel rapide, kara sinjoro, se mi nur posedus centon mi volonte ilin donus.”

Bookström ridetante riverencis.

(daŭrigo p. 3)

## Mia vizito al „Prinses Beatrix”

la 30-an de junio '56

Antaŭ du semajnoj iu el la ĉeestantoj de nia klubkunveno subite demandis al mi: „Ĉu ne estas bona ideo donaci Esperanto-lernolibron al la princino Beatrix, ĉar ŝi nun sukcese faris sian fin-ekzamenon?”

Mi pripensis pri tiu demando kun iom da dubo pri la ideo, ĉar mi estis konvinkita, ke nia reĝidino baldaŭ estos tute okupita per nova laboro dum sia estonta studenta tempo. Kaj krom tio nura lernolibro ŝajnis al mi ne sufiĉe

taŭga kaj bela kiel donaco. Sed la ideo en si mem estis bona kaj instigis min al nova ideo!

Ĉar post kelkaj tagoj mi legis la sciigon en la ĵurnalo, ke nia reĝidino Beatrix vizitos Amsterdam por post sia fin-ekzameno de la mezgrada lernejo veni en kontakton kun la nederlanda popolo, kaj tiam mi subite pensis: „Tio devas esti la okazo por prezenti ion al ŝi, por ke ŝi dum tiu tago ankaŭ kontaktigu kun reprezentantoj de la Esperanto-movado. Kaj ni donacu ion belan pri Esperanto kaj pri Nederlando!”

Mi pripensis: „Sabaton, la 30an de junio estos ŝia unua persona kontakto kun la nederlanda popolo... kio do estas pli bela donaco ol la belega Esperanto libro „Nederlando” en la granda, impona formato kun ilustraĵoj en roto-gravuro kaj 16 koloraj bildoj prezenti la libron, „Nederlanda” al „Prinses Beatrix” nome de la Nederlandse Esperantisten Vereniging „La Estonto Estas Nia”.

(daŭrigo de p. 2)

Kiel vulturoj la ĵurnaloj sin ĵetis super tiun kaptajon: Okulvitroj lasitaj en korpo post operacio, kiun plenumis dumnokte kaj sekrete ne leĝa kuracisto, sed pura komencanto. Kaj la kortumejo preskaŭ krevis pro amaso malsata je sensacioj.

Sed kiel la sagaca leganto jam konkludis, la skandalo ne okazis. Cladgett ne gajnis kompensojn, sed kontraŭe, li jam estis perdinta kvindek funtojn kaj nur aspektis kiel mizera ombro de si mem. Fine li frapis la pardonon de Bookström kiel povra pekulo:

„Postulu, mi pagos,” li spirĝemis tio sonis kiel g-r-r-rump, r-r-rump.

„Sed mi decidis ke vi mortaĉu!” Tamen Bookström estis ja homo kaj submetis la rimarkindan proponon:

„Mia kara, vi establos fondaĵon, el kiu malriĉaj, indaj studentoj ricevos sumon poste repagoton. Mi memoras, ke iam vi parolis pri kvindek-mil dolaroj. Dolaroj aŭ doloroj, ĉu ne? Cetera operacio estus pli malkara.”

La vorto „operacio” decidis. —

Tiun fojon D-ro Banza mem volis fari la laboron kaj ĵeti rigardon en la transcendon. Kiam li reaperis li estis ravita.

„Ĉu vi povas imagi,” sorĉite li spiris, „stari en la centro de imensa sfero kaj vidi subite ĉiujn organojn ĉirkaŭ vi. Super mi la intestoj, dekstre la lieno kun la okulvitroj apude, maldekstre la hepato kaj sub miaj piedoj la peritoneo. Sed estis iom malhele. Mi ne povis ĝin elteni, kvankam mi volis restadi longan tempon en li. —

„Tamen vi ne estis en li.”

„Sed jes, mi ĵus diris. Mi estis en li kun la stomako antaŭ mi, la veziko post mi. En li mi estis.”

„Ja ŝajnis al vi tia. Sed viru; se vi estus dudimensia kaj meze de ĉi tiu cirklo, estus malfacile vin konvinki, ke mi ne estas interne de la cirklo.”

fino

lernebla ol ekzemple la francon, germanan aŭ anglan lingvon.

Mi donis al la reĝidino la malgrandan „rapidkurson” „De Wegwijzer”.

„Beatrix” treege admiris la libron „Nederlando” kaj respondis ke ŝi ankoraŭ ne konis la enhavon, sed nur vidis la libron en montrofenestro. Desegnisto de mia oficejo desegnigis belan „dediĉon” sur la unua paĝo de la libro en la naciaj koloroj, ruĝa, blanka, blua, kun verdaj Esperanto-steloj... kaj mi povis vidi ke tio tre plaĉis al ŝi.

Fotografistoj faris fotografajojn dum ke Beatrix kaj mi kune rigardis en la libro, kaj mi havis la okazon multe rakonti pri Esperanto. Pri la petskribo al la „Unuigintaj Nacioj” subskribita de 15.000.000 personoj, pri la lecionoj de Mag. Pragano en la universitato, pri la simpla gramatiko kun reguloj sen esceptoj, pri la finaĵoj, o, a kaj e, pri la prefikso, „mal”, k.t.p. k.t.p.

Ĉiu aŭskultis kun granda atento. Tiam la urbestro diris: „Kio estas „Ĉerizoj” en Esperanto?” Ni do manĝu „ĉerizojn” en la ĝardeno. Kaj tion ni faris. Ni ĉiuj iris en la belegan ĝardenon kun multaj floroj kaj lagetoj.

Mangante ĉerizojn en la brila sunlumo, ni babilis kun Beatrix pri ŝia vojaĝo al Romo kaj intertempe oni faris multajn fotografajojn kaj ankaŭ filmis. Ni aŭskultis belan flutkoncerton en la freŝa aero. Post tio ni trinkis kafon en la ĝardeno kaj tiam venis la tempo por la foriro de Beatrix kaj la invititoj al la sportejo. Mi metis mian subskribon en la gastoj-libro, kaj dankis kaj adiaŭis la eminentulojn.

F-ino v. d. Beek.

### Korespondado

S-ino Henriette Roose-De Kersgier BRUGGE, Ste. Klaradreef 59, (Belgujo) deziras korespondi pri akŭs-metodoj kaj infanprizorgado en la unua vivjaro, kun la jenaj landoj: Ĉinujo, Japanujo, Rusujo, Hindujo. Volas ankaŭ interŝangi librojn, broŝurojn, artikolojn.

F-ino Delmestre Andreina, instruistino Via Duca D'Aosta 25 GORIZIA Italujo.

F-ino Marisa Arata, GENOVA Italujo Via Francesco Dassori 37.

S-ro Karel Vala OSTRAVA I Zahradni 1 Ĉeĥo-Slovakujo (15-jaraĝa studento).

S-ro Kiichiro Date, 106 Nishi 1 chome, Kitabatake Abeno-ku OSAKA Japanujo (30-jaraĝa asekura oficisto).

# Flandra Ligo Esperantista.

**Prezidanto:** Gerard Debrouwere, Magdalenastraat 29, Kortrijk.  
**Sekretario:** Maertens G., Pr. Leopoldstr. 51, St.-Kruis, tel. 33445 (dum la ofichoroj).  
**Kasistino:** F-ino J. Terrijn, Raapstraat 74, Gent.  
**Biblioteko:** E. A. Koot, Joh. de Meesterstraat 12, Utrecht (Nederland)  
**U.E.A. peranto:** Dr. F. Couwenberg, Koninginnelaan 14, Blankenberge P.C. 4161.35.  
**Redakcio F.E.:** Drs. Fern. Roose, Ste. Klaradreef 59, Brugge.  
**Koresponda kurso:** H. Pirennelaan 25, Gentbrugge.

## Iom pri la Agado de Nia Ligo

Rev. Frato Arni De Corte kiu skribis

La Sta Patro, la 11an-2'55, proponis la fondiĝon de la „Papa asocio de la Religiaj vokacioj”. Tiu asocio jam tiel progresis ke ni ricevis cirkuleron de Kardinalo Valerio Valeri, prefekto de la Kongregacio de Religioj, en kiu li petas la kunlaboron de ĉiuj institutoj kaj la alsendon de ĉiu propaganda materialo. Komprenoble mi tuj sendis la Esperantajn prospektojn pri nia Kongregacio akcentante ke per la Lingvo Internacia mi faras propagandon sur tereno internacia. Responde venis la ĝojiga letero:

Dal Vaticano 3an de Marto 1956

*Tre Estimata Frato,*

*Mi estas feliĉa sciigi al vi ke la Sta. Patro sentis sin tre tuŝita de viaj afablaj vortoj, kaj pro via propagando internacia kiun vi sendis en via lasta letero.*

*Kiel aprezata signo de tio, la Sta. Patro ŝarĝas min transdoni al vi Lin dankon, kaj elkore Li donas al vi al ĉiuj membroj de via instituto la favoron de la Apostola beno.*

*Aĉceptu, tre kara frato, la certigon pri mia religia sindono.*

*A. Dell' Aqua. Subst.*

Mi konscias pri la graveco de tiu aprobo, por la sukceso de Esperanto en religiaj medioj. Tial mi ree instigas la Esperantistojn peti informojn pri nia Kongregacio, por tiel pliiĝi la favoran impreson ĉe la estraro.

Mi koncize citas la de mi faritan laboron dum la pasinta jaro ĝis nun, favore al Esperanto. Mi verkis jenajn artikolojn:

*Deus Charitas Est*

Majo '55 „Men moet er maar an denken (pri mia Eo. propagando) *Entre Nous* (lando: Kanado) *Helpende Handen* (revuo por la Fratoj en Belgio)

Okt. '55 „L'Esperanto dans l'Apostolat”

Jan. '56 „Eo. op het Eucharistisch congres te Rio de Janeiro”

Marto '56 „Een Katholieke Eo. pionier”

Aprilo '56 „Het Intern. Kath. Informatiebureau”

Majo '56 „Ik dank mijn bekering aan Eo.”

Junio '56 „Eo. kongres te Gent”

*Jong Karitas (propaganda-revuo)*

Okt.-Nov. '55 mencio pri Eo. propaganda materialo

Dec. '55-Jan. '56 „La rikolto estas granda. Dio estas fidela. Kie restas la necesa helpo?”

Feb.-Marto '56 „Een brief van achter het ijzeren gordijn”

Junio-Julio '56 „De Gerk der stilte” (artikolo kun foto).

Tiuj preparaj artikoloj celis vekti la intereson de la Fratoj, kion mi certe atingis, ĉar multaj petis informojn kaj esprimis sian deziron partopreni kurson.

Mi ricevis la permeson mendi la Esperantajn literojn por nia presejo, malgraŭ la sufiĉe altaj kostoj. Mi nun esperas baldaŭ komenci mian kurson en nia monaha revuo „Helpende Handen”.

Niaj tutkoraj gratuloj! Al la aliaj ligoj ni diras: jen ekzemplo! Kaj ni faras demandon: kion vi faras? Raportu foje al ni!

## Esperanto-renkontiĝo en Gent

La 1an de Julio, la Fratoj de la Karitato de la instituto St. Julien en Gent ekspoziciis la laborojn de la lernantoj. Je tiu okazo, la Esperantistoj de la Genta grupo kaj eĉ kelkaj el Loveno, Bruĝo kaj Lokeren kunvenis en la instituto. Mi metis Esperantajn afiŝojn kaj surbendigis Esperantan alparolon al la samideanoj, kiu estis dum la tago disaŭdigata per la laŭparoliloj. La ĉeesto de la Esperantistoj kiuj en ĉiuj salonoj aŭdigis nian lingvon, faris bonan propagandon ĉe la Fratoj kaj eĉ ĉe la vizitantoj. Per ĉi-tiu vojo mi volas danki elkore la samideanojn kiuj per sia ĉeesto pruvis sian simpatian por niaj instituto kaj laboro; kaj ankaŭ pro la propagando kiun ili faris por nia Lingvo Internacia.

Frato Arni.

## Grupa Vivado

„Paco kaj Justeco” Brugge

Tijdens de zomermaanden werd er druk aan Volley-Ball gedaan op de Woensdag-avond en de Zaterdagmiddag. Enkele leden gingen op reis en vertelden daarover nadien in de groep. Marie-Louse Roose trok naar Spanje; Mevr. Henriette Roose-De Kersgieter naar Evian en Genève en trok hoog-Savoie door. Onze secretaris R. Iserentant deed natuurlijk een lange fietstocht, deze keer naar Duitsland. Enkele leden trokken gezamenlijk naar de Rodenbachfeesten te Roeselare. Sano Goodes kwam in Augustus met enkele Engelse Esperantisten weer naar Brugge. De eerste Donderdag van September bestuursvergadering om het winterwerk te bespreken en in te zetten.

## Bileto de la Sekretario

Ni skribas fakte ĉi tiujn liniojn dum ke la organizado de la libertempo ankoraŭ estas en plena efektiviĝo. Tamen la planoj por la laborsezono devas esti fiksataj, por ke la nova agadperiodo bone sukcesu.

La du plej gravaj punktoj ellaborendaj celas ambaŭ la altiron de novaj fortoj al F.L.E. Envere estas tute normale, ke ĉiujare kelkaj membroj forlasis niajn vicojn. Kaj tio eĉ ne tiel gravas, se nur novaj adeptoj ekvilibrigas aŭ eĉ pligrandigas la asocion. Lastatempe, tio ne plu efektiviĝis. Pro la fakto, ke la Ligo konsistas el grupoj, estas tiuj eroj kiuj per kursoj, varbas la gemembrojn. Konsekvence, la estraro petas kaj insistas ĉe la grupaj estraroj, ke ili tuj planu kaj organizu kurson. La monato Oktobro plej taŭgas por la komenco. Do, sufiĉe da tempo restas. Por bone prepari tiun kurson, la kluboj anoncu ĝin. 1) al la gazetara servo de la Ligo; 2) al la lokaj ĵurnaloj; 3) al la loka reprezentanto de V.T.B. (anonco en la V.T.B. kaj V.A.B. revuo) 4) al la liga sekretario.

Por ekspozicio petu librojn al F.E.I. kaj diverslandajn Eo. ĵurnalojn al la sekretario. Post enskribo de la kursoj, komuniku al la sekretario nomojn kaj adresojn; li sendos al ĉiu paketon kun Eo. materialo. Se propaganda — aŭ enkonduka parolado estas dezirinda, nia vic-prezidanto Drs. F. Roose prizorgas tion. Se vi aranĝas ekspozicion kaj paroladon, ĉiam donu provlecionon laŭ la Csehmetodo, sed ne anoncu la provlecionon. Por prepari la terenon, ne forgesu ke persona varbado estas la plej malmultekosta kaj samtempe la plej efika maniero. En la lokoj kie ne povas okazi kurso, aŭ se la kan-

(daŭrigo p. 7)

## BIBLIOGRAFIO

JARLIBRO de U.E.A. 1956 unua parto aperis iom pli malfrue ol en la antaŭa jaro, sed la kaŭzo estis la transloĝigo de la Centra Oficejo de Londono al Rotterdam. La enhavo estas kiel en antaŭaj jaroj, kvankam estas kelkaj ŝanĝoj. Prof. Lapenna verkis antaŭparolon. La tuto aspektas bona kaj certe la aktivaj membroj trovos en ĝi valorajn sciindaĵojn.

\* \*

LA SENPERA VERBIGO DE ADJEKTIVOJ. Represo de artikolserio en „Dia Regno” 1955. De H. A. DE HOOG.

32 p. 10,5 x 16. Libroservo de K.U. N.E., Den Haag. Prezo gld. 0,60.

Sendube ne malmultaj esperantistoj malagrade surpriziĝis, eksciinte ke en la kunveno de la Akademio dum la Harlema Kongreso s-ro Isbrucker kondamnis la „uzon de — AS kun adjektivaj radikoj” kiel lingvan herezon. Oni do estis perfortinta Esperanton dirante, diradante: „li pravas; tio sufiĉas; ŝi malsanas”. Ĉar en bona Esperanto, tiel atertis s-ro Isbrucker, oni diras: „li estas prava; ŝi estas malsana...”

Tamen. Ĉu ne „Tra la labirinto...” (p. 231) iam instruis al ni: verbo derivita de adjektivo signifas *esti ...a* (li fieras = li estas fiero)? Ankaŭ Kompleta Gramatiko de Fruictier (p. 87) samsence parolas dirante ke adjektiva radiko povas naski verbon esprimantan estadon, per simpla alprenado de *i(as, is, os,...)*, ekz.: sani, utili, furiozi”. Sed samtempe ĝi ankaŭ konstata, ke oni pli ofte uzas la analizan formon: *esti sana, utila, furioza*.

Siavice Plena Gramatiko (§ 16 kaj § 27B) klarigas, ke la i-finaĵo post adjektivaj radikoj signifas *esti -a* (puri = esti pura), cedante tamen ke ĉe verbo el koloradjektivo (nigri, blanki) ne temas pri simpla konstato (esti nigra, blanka), sed pri tio, ke io *impresas nigre, blanke*.

Foliumante Plenan Vortaron oni aliflanke trovas nur kvardekon da senpere verbigitaj adjektivoj, el kiuj nur 24 estas klarigitaj per la analizo *esti -a*. Ĉu do tiu ŝparemo sugestu limigitan uzadon de la senpera verbigo? Aŭ ĉu ĝi estas neatentinda pro tio, ke P.V. ne mencias ĉiujn akceptitajn derivadojn?

Kaj oni petas konsilon de la „Konsilanto” ..., kie (p. 46 de la 2-a eldono) ektintas aliaj sonoriletoj: senpera verbigo de adjektivo estas permesebla nur se la verbo signifas *agon efektivan* (kp.: mono estas utila, sed bedaŭrinde ofte *malutila*) aŭ *ŝajnan* (ekz.: la arbaro *kvietis*). Kompreneble la studanto stumblas pro la „ŝajnaĝo” de la arbaro kiu *kvietis*. La

konfuzo ne forpeliĝas, kiam li malkovras en „Esperanto 60-jara” de la sama aŭtoro, kontrolita de la Literatura Komitato FLE, formojn kiel „necesas, pretas, malfacilas, akcepteblas, konstateblis, menciindas,” k.a. Ĉu ili efektive esprimas agon, aŭ eĉ nur ŝajnan agon? Kiu povos nin tiri el la kaŭzo, komprenigi kie finiĝas la statesprimo „estas menciinde”, kie komenciĝas la agesprimo „menciindas”?

Per sia drasta eldiro la Prezidanto de la Akademio nete tranĉis la aferon por si mem, deklarante sin kontraŭ la senpera verbigo de adjektivoj: „Tio ne estas ĝusta.”

Kompreneble, propra opinio ne estas leĝo por aliaj, eĉ ne la privata opinio de eminentulo kiel la Prezidanto de la Akademio.

Ekzistas ja en Esperanto pluraj lingvaj problemoj kiuj ankoraŭ ne trovis definitivajn solvojn. Literaturistoj, gramatikistoj serĉas la ĝustan vojon, sed ne rajtas altrudi sian vidmanieron kiel ekskluzive bonan al la aliaj esperantistoj. Nur la iom post iom ĝeneraliĝinta uzado, sankciita de la Akademio, fariĝas deviga.

Kaj jen aperas la argumentoj per kiuj Akademiano Downes iamaniere apogas la malaprobajn de s-ro Isbrucker. Argumentoj kiujn s-ro De Hoog funde ekzamenas kaj provas refuti en sia studaĵo „La senpera verbigo de adjektivoj.”

Downes bazas sian teorion sur Lingva Respondo en kiu Zamenhof konstata, ke „la verbaj finaĵoj AS, IS ĝis nun ne havas la signifon *estas, estis*.” Tiukaze, D. konkludas, verbo kiel „blanki” ne povas signifi „esti blanka”. Sed la adjektiva radiko, same kiel okazas ĉe la rekta verbigo de substantivo (marteli = martele agi), ricevas adverbajn karakterojn. La i-finaĵo havas do aktivecan signifon, kaj „blanki” povas signifi nur „impresi blanke”. Tial „la floroj belas” estas sensecaĵo, ĉar la beleco neniel sugestas ian agon, ĝi estas kvalito tute stata.

La argumentado unuavide ŝajnas tre serioza, sed DH lerte trovas la vundeblajn lokojn.

La citita L.R., li prave rimarkigas, ne koncernas la senperan verbigon de adjektivoj, sed tutspeciala formojn kiel „amatas, amitas” per kiuj kelkaj deziris anstataŭigi la pli longajn „estas amata, estas amita”. Tiel Zamenhof, provizore almenaŭ, malaprobis nur ŝanĝon en la verbosistemo. Tio evidentiĝas el alia L.R. (bedaŭrinde ne enpresigita en la libroforme eldonitaj „Lingvaj Respondoj”) per kiu Z. mem proponis formojn kiel „pii, feliĉi” por „esti pia, feliĉa”. Cetere Z. mem senpere verbigis adjektivojn

en sia Proverbaro: „averas, utilas, malsatas, egalas” k.a., kun la evidenta signifo: „esti -a”. Kaj fine: Z. mencias „sani, sanu, malsani” en la Ekzercaro de la Fundamento. Ĉu ili povus signifi ion alian ol „esti -a”?

DH. tiel gajnas la unuan poenton: la signifo „esti -a” ne estas kontraŭfundamenta kaj la uzado ĉe Z. mem ĝin konfirmas.

Sed tiu konstato ne kontentigas DH. kiu sekvas D. sur lia propra tereno, esplorante la leĝojn de la vortfarado.

Ne ĉiu verbigo de substantivo estas analizebla per „esti -e”, malgraŭ la aserto de D. Verboj el la Proverbaro kiel „reĝi, sklavi” ne povas signifi ion alian ol „esti reĝo, sklavo; esti en stato de reĝo, sklavo”. La i-finaĵo do ne havas propran signifon, ĝia sola funkcio estas: verbigi; kaj la rezultanta verbo montras jen agon, jen staton. Alivorte: la signifo de la verbo dependas de la interrilato inter la radiko kaj la i-finaĵo. Interrilato jen adverba, jen adjektiva, laŭcirconstance. Interrilato ne videble esprimita, sed implicita, trovebla per analizo.

Kio fariĝas ĉe substantiva radiko, ankaŭ povas fariĝi ĉe adjektiva. „Pravi” do samvaloras kiel „esti prava”, kaj „blui” kiel „esti blua” aŭ „impresi blue”, laŭ la kunteksto.

Tiel provinte, ke la analizo „esti -a” ĉe verbigado de adjektivoj ne kontraŭas la regulojn de la vortderivado en Esperanto, DH. venke finas la teorian turniron tiel brile kiel antaŭ nelonge li traktis „Du malsanoj(n) en Esperanto”. Ĉi tie li povus definitive mallevi la kurtenon. Sed li antaŭsentas dubemiran demandon de la leganto: se la analizo per „esti -a” estas tiel natura, kiel oni povus klarigi ke nur kelkaj malmultaj dekoj el la 400 oficialaj adjektivoj estas verbigitaj en komuna uzado, ke aliflanke en kelkaj kompetentulaj medioj ili foje renkontas absolutan kontraŭstaron?

Tiuj faktoj ne eskapis lian atenton. DH. memorigas, ke kelkaj adjektivoj neniam estas uzataj predikative. „Tiu mano estas dekstra” estas ne-eblo frazo. Pro tio ankaŭ „dekstras” estas ne-eblo. Kaj se el la multaj aliaj nur kelkaj alprenis la verban formon, tion kaŭzas la influo de la nacilingvaj kutimoj. „La senpera verbigo de la adjektivoj estas fremda al la karaktero de la hind-eŭropaj lingvoj.” Generale nur la verbigoj respondantaj al verbo en iu nacia lingvo (kuraĝi, kapabli, furiozi, egali, atenti, avidi, ekskluzivi, favori, k.s.) ĝuis tuĵan sukceson. La aliaj devos atendi sian vicon ĝis la evoluo pro ĉiam pli efikanta analogio fortigos kreskantan Esperanto-lingvosenton.

(daŭrigo p. 6)

(daŭrigo de p. 5)

Eble la leganto bedaŭros, ke la aŭtoro ĉi-foje ne obeis sian jam konatan emon al pli ampleksa dokumentado, ke li ne opiniis oportuna ilustrati la popularigon de la kreskanta lingva kutimo per taŭgaj citaĵoj el la nuna literaturo. Espereble li rezervas tian surprizon por baldaŭa estonteco.

Alia rimarkigo sin trudas. En sia esplorado la aŭtoro traktis nur adjektivajn radikojn (se ni esceptas „superi” — el la prepozicio „super” — kiu probable vojerariĝis). La proponita temo ja ne postulis ion alian. Sed nur la simplajn verboformojn -i, -as, -is, -os, -us, -u la aŭtoro konsideras. La demandon, ĉu ankaŭ la participoj („atentanta”) kaj kun ili la kunmetitaj tempoj havas ian ŝancon penetri akcepteblan lingvouzon, li ne tuŝas.

Ekzistas aliaj adjektivoj, ne radikoj ĉi-foje, kiuj ankaŭ senpere verbiĝas, kaj pri kiuj la leganto ŝatus informon. Ni ne unuoloke celas la participajn formojn „aminta, amita” kies verbigo post la malaprobo de Z. preskaŭ tute malaperis el nia literaturo, kiel konstatis DH. Kio tamen ne malhelpas, ke foje aŭdiĝas voĉo pledanta por mallongigo de la kunmetitaj verbotempoj: „sciintus” anstataŭ „estus sciinta” (F. I. Wiener, en „Esperanto” 1956 p. 98).

Ni pli ĝuste celas la vortojn derivitajn pere de la t.n. adjektivaj sufiksoj EBLA, INDA, k.s., kiel ekz. „rimarkeblas, rimarkindas”, kiuj pli kaj pli enŝoviĝas precipe en la skribitan lingvon. Mirigas nin, ke la aŭtoro kontraŭ sia kutimo iom senceremonie malembarasas sin, prezentante personan guston prefere ol objektivan prijuĝon. „Mi ne povas admiri la miaopinie tro longajn konstatablas, rimarkindas, k.s.”

Nu, se pri gustoj oni disputi ne devas, pri la trolongeco oni tamen povus, kaj decidiga motivo por mala-probi ĝi ne estas.

Sed ĉi ĉio provizore estas nur flankkafero. La ĉefaĵo restas, ke la studaĵo konsistigas seriozan pravigon de senpera verbigo de adjektivoj prudente kaj ne trorapideme aplikata. Kiu interesiĝas pri lingvaj demandoj nepre konatiĝu kun la verketo; li neniel bedaŭros.

F. Couwenberg.

\* \*

Por Nederlandanoj aperis ĉe la eldonisto J. Muusses, Purmerend, Nederlando, *Oefenboekje bij het Esperanto Leerboek* verkita de S. Ioj C. E. Zondervan kaj D. ro W. J. A. Manders. Prezo gld. 1.—.

Ĉi tiu libreto celas doni ekzercomaterialon por tiuj kiuj preparas sin por la elementa ekzameno kaj tial la verkistoj aldonis ankaŭ kelkajn taskojn de antaŭaj ekzamenoj. Certe

ĝi estos bone akceptata de la gestudentoj.

Ĉe ia sama eldonisto aperis ankaŭ *4a eldono de la libreto „Laborilo I”* apartenanta al la internacia lernolibro „*Sub la verda Standardo*” la konata rekta metodo por esperantoinstruo al infanoj verkita de S. ro P. Korte, Lernejestro.

Ke jam necesis 4a eldono parolos por si mem. Prezo de la libreto estas gld. 1.—. Havebla ĉe la Libro-Servoj.

\* \*

*ELFKTITAJ PRELEGOJ* estas la titolo de libro en kiu estas kolektitaj diversaj gravaj prelegoj faritaj en la Someraĵ Universitato 1949—1954, Prezo gld. 3,90; \$ 1,10. Eldonisto J. Muusses, Purmerend, Nederlando.

Ni povas forte rekomendi ĉi tiun eldonon, kies enhavo estas tre varia kaj ampleksas 6 prelegojn rilatantajn al sociaj sciencoj kaj 6 kiuj koncernas la naturajn sciencojn. La prelegoj aperis unue en Scienca Revuo kaj estis tre bona ideo aperigi ilin nun ankaŭ en libroformo formanta tiel la duan volumon de Someraĵ Universitataj prelegoj. La unua volumo enhavas tiujn kiuj okazis en la S.U. en Malmö en 1948. Por ke ankaŭ estonte la eldono de tiaj prelegoj estu garantiata estas necese ke la esperantista publiko montras sian interesigon aĉetante la jam nun aperintajn.

\* \*

*GEOGRAFIA REVUO. Organo de la Internacia Geografa Asocio. Redaktoro: Lic. Tibor Sekelj, Beograd.*

Abonprezo por unu jaro (minimumo 4 numeroj): unu usona dolaro.

Unua numero: majo 1956; 32 p.; 16 x 23.

Konvinkite, ke „geografiaj temoj nepre interesas ne nur fakulojn, sed nian tutan esperantistan publikon, ĉiam scivoleman kaj vojaĝeman”, la ĵusfondita Internacia Geografa Asocio konsideris sia devo eldoni „revuon kompareblan kun la similtemaj naci-lingvaj publikigaĵoj.”

La unua numero aperis, ankoraŭ modesta laŭ amplekso, sed ne sen merito rilate la elekton de la artikoloj, konvene ilustritaj, kaj ne abstrakte sciencaj, kiel oni povas prijuĝi laŭ la titoloj:

*Esplorojago tra Amazonio (T. Sekelj);*

*La internacia geofizika jaro (Prof. F. Dominko);*

*Lukto de la antarktaj ekspedicioj kontraŭ la vetero, glacimontoj kaj glaciezertoj (M. J. Gonzalez);*

*Mia ascendo al Elbruso en Kaŭkazo (Prof. d-ro O. Reya);*

*La Valo de Reĝoj (Zdravko Pečar);*

*Tra la mondo: ardo de mallongaj geografiaj novaĵoj.*

Espereble troviĝos sufiĉe da inte-

resigantoj por efike apogi laŭdindan iniciaton kiu povus doni al Esperanto novan puŝon antaŭen sur tereno kiu laŭ lingva vidpunkto rezervas ankoraŭ multan laboron farendan.

F. C.

\* \*

*ESPERANTO Tor zur Welt* estas la titolo de Katologo, eldonita de la Limburger Vereinsdruckerei, Limburg Lahn, Diezerstr. 17—19, Germanujo.

La Katologo estas verkita en la germana lingvo kaj enhavas la titolojn de multaj esperantaj verkoj.

Preso kaj papero estas tre belaj kaj laŭ nia scio estas la unua fojo en la historio de nia lingvo ke granda eldonejo eldonis en nacia lingvo tian ampleksan katalogon pri esperantaj verkoj. Speciale la germana popolo havas nun la eblon konstati ke Esperanto havas literaturaĵojn laŭ ĉies gusto. Ni deziras al la eldonisto multan sukceson.

\* \*

*CIRKAŬ LA NASKIGO DE MIA MISIO. Martinus. El la dana tradukis C. Graversen. La Spirit-sciencia Instituto de Martinus, Kopenhago, 1956. 60 p.; 12 x 19; bind.*

Martinus ne ŝatas paroli pri si mem nek tiri ian vantajn gloron el la Dia revelacio kiun li spertis. Eĉ liaj spiritalaj vizioj, li diras, estus sensignifaj, se ili ne estus ebligintaj lin montri, ke la plej altaj veraĵoj de la vivo identas kun scienco, kun arto kaj amo. „Vivante laŭ miaj vortoj, ĉiu ekamos la Patron..., ĉiujn kaj ĉion...”, kio estas ... la plej alta formo de la vivo, la plej intensa sento de ĝojo, la sperto de vera feliĉego.” Nur tial li sentis sin devigata paroli pri sia misio. Martinus tamen ne estas la tioma mondsavanto, kiu minacas ĉiujn skeptikulojn per la fulmoj de la Dia kolero. Li ne celas forlogi iun, kiu en sia religia kredo jam trovis feliĉon. Li tute ne predikas novan „kredon”. Se infano de la moderna epoko trapenetrata de scienca sinteno, bezonas pli ol nur kredon, bezonas scion pri la mondmistero, ĝi trovas la avidatan instruon en la spirita scienco de Martinus, kaj feliĉiĝos, se ĝi identigas kun ĝi sian propran vidadon.

Jen mallonge la mesaĝo de Martinus en ĉi tiu libreto, direktata al la „absolute senpartiaj verserĉantoj, al kiuj la pura scienco estas sankta... kaj la sola reala bazo por iliaj rezono, juĝo kaj tuta agmaniero. Por detala pritraktado de sia spirita scienco, li resendas al sia ĉefverko „Livets Bog”: La Libro de Vivo.

Verketo tole bindita, zorge presita; la lingvo, kontrolita de la SAT-Literatura Komitato, estas neriproĉinda, se oni konsentas pri ĝia multe kritikata prefero por la TIOM-KIOM-esprimoj.

F. C.

(daŭrigo de p. 6)

**NOKKEL TIL ESPERANTO.** (Ŝlosilo de Esperanto por Norvegujoj).

*Eldonita de Norvega Esperantista Ligo en kunlaboro kun U.E.A. 3-a eldono (26-a ĝis 45-a milo). Oslo, 1956.*

32 p. 7,5 x 11. Prezo: kr. 0,75 plus aŭfranko.

Estas tute superflue kanti la laŭdon de la liliputaj lernolibroj kiuj nomiĝas „ŝlosiloj”. Menciindas ke la eldoninto penis prezenti vortoliston kiel eble plej kompletan (2275 vortoj, preskaŭ ĉiuj radikoj) kaj ĝisdatan, provizante nin per la plej novaj akiraĵoj el la Suplemento: flak, jubil, ĵaz, ĵerz, kroĉet, mitral, plast, plong, salikok, ŝalt, taksij, trak, uzin, zip, k.a. La ŝlosilo kelkfoje eĉ preterrapidigas Plenan Vortaron, enlistigante tute novajn vortojn: aprez, aŭk, bus, empetr, hipoglos, hamemor, horaj, instep, karvi, kvik, lagop, saŭr, splint, kooperaci.

Kelkaj neoficialaj vortoj diferencas de tiuj el P.V. Oni miras kial. Ni citas: ĉik (ŝika); ĥejrant (keiranto ĥim (ĉimo)); pomel (pampelmuso); taraksak (leontodo?); ŭat (vato). Ĉu ŝlosilo estas la taŭga loko por montrisan malkonsenton pri vortformoj ankoraŭ ne sankciitaj de la Akademio tamen rekomenditaj le nia plej aŭtoritata kaj plej universale uzata vortaro?

Aliflanke forfalis el la listo la kulture menciitaj korelativoj, afiksoj kaj aliaj vorteroj troviĝantaj en la konciza gramatiko. Tio ne ĝenas se la uzanto, antaŭ ol decifri tekston, jam atentegite trastudis la 10-paĝan gramatikon kaj scias ĝin kvazaŭ parke-re. La ŝlosilo tamen origine havis

(daŭrigo de p. 4)

didato preferas skriban kurson, donu la adreson de ĉiuj interesatoj al S-ano A. Vandeveld (vidu la adreson sub F.L.E.). Cetere, pere de multaj artikoloj kaj anoncoj la ligo diskonigos sian skriban kurson. Por ebligi tion, la ĝenerala jarkunveno dum lasta Pentekosto, donacis pli ol 1.000 F. al la estraro. (*Restas ankoraŭ ebleco aldoni ion, pagante je la pĉk. de la ligo iun sumon kun indiko „por la propagando de la skriba kurso”*).

Tiel la klopodoj de la sekcioj, de ĉiu ligano kaj de la estraro koncentriĝas je la sama celo: pligrandigi nian rondon.

*Familiaj membroj.* La premiitoj de la lotumado 1956 estas: 1) S-ino Vandeveld (Gent); 2) S-ino Debrouwere (Kortrijk); 3) F-ino Hofkens (Antwerpen). La feliĉulinoj ricevos (aŭ jam ricevis) komunikon de la sekretario pri la premio-elekto. Ankaŭ por la varbado 1957 la estraro disponigas tri premiojn, denove librojn kies titolojn ni pli poste sciigos.

ankaŭ praktikan celon. „Skribu, oni iam konsilis, skribu esperantlingve al ne-esperantisto, aldonu la ŝlosilon ŝlosilon por lia nacia lingvo, kaj li sen granda peno komprenos.” Ni prave povas timi, ke pro la ellaso de tiuj ĉarniroj de la lingvo, facila kompreno fariĝos mito.

Por pli facila uzebleco rekomendindas konsiderinde mallongigi, eĉ tute ellasi, la liston de „la plej gravaj komercaj terminoj” kaj tutsimple envicigi ilin en la ĝeneralan liston. Tio ŝparigos tempon. La plimulto de tiuj t.n. teknikaj vortoj ja eniris la komunan lingvon: aŭfrank, akapar, akt, aktiv, anonc, banderol, kaj tiom da aliaj ne speciale pensigas pri komerco.

La ortografio estas bone prizorgita, kio nepre necesas ĉi-kaze, ĉar ĉiu erareto fariĝas kaprompilo al antaŭkomencanto. Ni notis nur: p. 4: ama'at'a; p. 5: bofato. Ĉu „akuŝ” estas ĝuste tradukita?

Ankaŭ la informoj pri Esperanto ĝisdatiĝis. Ekz.: La Esperanto-literaturo ampleksas nuntempe (1956) 15.000 verkojn; internacia peticio al la Unuigintaj Nacioj; la Konferenco de UNESKO en Montevideo esprimas sian simpatian al la Movado kaj konsentas al UEA la konsultajn aranĝojn. Mallonge: bonega propagandilo por norvegaj medioj.

F. Couwenberg.

**Ezopa Saĝo**, sesdeksep fabloj, verse reverkitaj de K. Kalocsay. Eldono de Eldonejo Koko, Komuna Konversacia Klubo, Kopenhago, 1956. Vinjetoj de Børge Hamberg. Formato: 13 x 20,5 cm; 127 paĝoj. Prezo: 5 guldenoj.

Mi eksidis en la vagonaro por mia ĉiumatena veturo al mi laboro, malfermis ĉi tiun ĵus aperintan verkon de nia admirata unua inter la esperantistaj poetoj, kaj eklegis. Ne longe poste venis la konduktoro: esperantisto. Mi montris al li la karan novan akiraĵon, kaj li, trafoliumentante ĝin, diris: „Ho, poezio! Tio ne estas io por mi!” Mi diris: „Nu, kaj kial do ne?” „Tro malfacila estas por mi, simplulo, la poezio; por mi pli taŭgas prozo.”

Jen ofte renkontata kaj tamen malprava opinio. Por pruvi al mia konduktoro lian malpravon, mi voĉlegis al li parton el la enkonduka biografio pri Ezopo, verkita en senrimaj, liberritmaj versoj, fakte en prozo verse aranĝita! Devis konsenti mia poezitimanto ke ja ne tiel malfacila estas tiu poezio.

Cetere, ĉu ne estas strange ke ni, kiel junaj infanoj ankoraŭ ne legipovaj, ne timis la versaĵojn, ke granda parto el la infana literaturo kiun voĉlegis al ni niaj gepatroj, estis versa kun rimo kaj ritmo, ke ni ŝatis tion kaj pro ĉi tiuj ecoj pli facile memoris la tekstojn? Ĉu do en nia posta vivo ni tiom proziĝis, ke el tio rezultis tia malprava timo antaŭ poezio? Ĉar ja malprave estas opinii ke la poezio estas malfacile, la pro-

zo, kontraŭe, facile komprenebla. Inter ambaŭ troviĝas facilaj, malpli facilaj, pli-malpli malfacilaj, kaj malfacilegaj specimenoj. La poemoj de Malhermé troviĝantaj lokon en la Nica Liteaturo Revuo 1 110 (n-ro 3) apartenas al la malfacilega speco. Tamen la Ezopa saĝo apartenas al la facile komprenebla kategorio, kiu tute ne estas tiel escepta kiel tiuj kun kontraŭpoeziaj antaŭjuĝoj emas kredi. Ĉi tiu Ezopa saĝo estas vera frandaĵo por simplaj homoj, same kiel por erudiciuloj, por maturuloj, same kiel por infanoj: vere salutinda fakto pro la ankoraŭ granda manko de porinfana esperanta literaturo. La nomo kaj renomo de la aŭtoro ja garantias ke ĉi tiu verko estas brila trezoro nova inter la jamaj multaj gemoj de nia literaturo. Krom 77 elektitajn fablojn, kies longo varias de kvar versoj ĝis kvin paĝoj, kaj inter kiuj ni ĝoje retrovas bonajn konatojn el nia junaĝo pri kiuj plej ofte ni eble eĉ ne konjektis ke jam Ezopo rakontis ilin antaŭ pli ol du kaj duona jarmiloj, la libro enhavas poemon pri la statuo de Ezopo, dekkvinpaĝan, tre interesan, anekdotecan biografion pri la legenda saĝulo-fablisto, kiu, se li ne efektive vivis, do tamen vivas per la fabloj al li atribuitaj: „Se Hellas lin ne naskis, ĝi lin kreis”. Finas la verkon dekpaĝa Komentario konsistanta el „Rimarkoj” pri la arto de fablado kaj ĝia historio, kaj pri la priezopaj legendoj: en ĝi troviĝas unu plia fablo kaj traduko de parto de fablo de La Fontaine, en kiu tiu apologias la arton de la fablado; „Notoj” kun sciindaĵoj pri kelkaj fabloj, kun klarigoj kaj fontindikoj; unupaĝa „Glosaro” kun vortoj netroviĝantaj en la dua eldono de Plena Vortaro.

Oni devas konstati ke ĉi tiu poezio estas bona poezio laŭla difino de Raymond Schwartz (Nica Literatura Revuo 1 198 (n-ro 5): „Bona poezio estas tiu, kiu malgraŭ ritmoj kaj rimoj konservas la ĉarmon de bona prozo.”

Nu, kio ankoraŭ? La libro havas ĉarman eksterajn: tola bindaĵo kun sprita vinjeto, da kiaj sekvos sur postaj paĝoj ankoraŭ multaj aliaj. Bela preso sur bona papero. Preseraro tre malmultaj. Ne aita prezo. Aĉetinda. Leginda. Releginda!

Ĉu do nenio kritikinda? Apenaŭ. Tamen, por pli reliefigi la bonkvalitecon de ĉi tiu nova verko, mi ne ŝparu pri la kritiko: En la fabloj 14a (La juĝo de la simio) kaj 63a (La lango kaj la mano) Kalocsay uzas entute trifoje la verbon „negi”; ĉu ne sufiĉus la komunuza „nei”? En la fablo 46a (La trovita hakilo) la lasta verso tekstas: Respondis la alia: „Ej! diru, vi pereis.” Fakte, tamen, li respondis: „Ej! diru, ni pereis.” aŭ „Ej! diru ke vi pereis.”

En la fablo 53a (La mensogema paŝtisto) ŝajne okazis grava preseraro en la tria verso, kiu nun, supozende nekonforme al la manuskripto, identas kun la oka: „La lup', la lup'!” - li kriis malespere. Anstataŭ teksti: „La lup' la lup'! ... (?) ... ure”.

(daŭrigo p. 8)

(daŭrigo de p. 7)

En la fablo 65a la unua strofo tekstas:

„La patro kun la juna filo  
Azenon portis al foiro.  
La patro en la selo sidis,  
La filo la azenon gvidis.”

Evidente la vorto „portas” en la dua verso estas netaŭge uzita. La efektiva portado nur poste okazos. Mi pensis pri eblo eviti la vorton „portas”. Jen kelkaj provoj: „Kondukis patro kaj la filo / azenon for al la foiro.” „Jen patro kaj la fil’ vojire / kun la azeno alfoire.” „Kun la azeno iris viro / kaj l’ juna fil’ al la foiro.” „Azenon patro kaj la filo / kondukis foje al foiro.” Mi ne dubas, ke Kalocsay mem trovus pli bonan solvon!

Laste, en fablo 76a (La aglo kaj la vulpo) troviĝas la esprimo „la flugantan birdon vengli” kie mia opinio korekte tekstus: „je l’ fluganta birdo vengli” aŭ „min je l’ fluga birdo vengli”.

W. P. Roelofs.

## U.N.E.S.C.O. - Novajoj

*Studioj pri la publika opinio rilate eksterlandanoj.*

Kio decidigas la starpunkton de ordinaraj homoj rilate eksterlandanojn kaj eksterlandajn kulturojn: ĉu la libroj, kiujn ili legis, aŭ la eksterlandanoj, kiujn ili renkontis, aŭ tio kion ili lernis en lernejoj, aŭ la personaj spertoj?

Por eltrovi tion, oni entreprenos testojn en kelkaj landoj de Okcidenta Eŭropo. La samaj demandoj estos faritaj al personoj apartenantaj al diversaj socitavoloj en ĉiu el la landoj kaj la respondoj estos komparitaj kaj analizitaj.

Tiu ĉi esplorplano, kiu estas parto de la programo de UNESKO koncerne la studon pri la kondiĉoj favorantaj internacian komprenigon kaj pacan kooperadon, estis diskutita de 20 sociologoj el 9 landoj dum kunveno organizita de UNESKO kaj okazinte inter la 26-a kaj 28-a de aprilo 1956.

La enketo komenciĝos en aŭtuno.

*Azio en la lernolibroj de okcidentaj landoj.*

Edukistoj el 16 landoj, kiuj kunvenis en la UNESKO-Domo en Parizo de la 2-a ĝis la 12-a de majo, kritikis la „ĝeneralan mankon de objektiveco” en la traktado de la azia civilizacio en la lernolibroj de okcidentaj landoj kaj en la instruado ĝenerale. La kunveno esploris la eblecojn kiel plibonigi la nunan staton. La edukistoj konkludis, ke la „instruistoj devas enigi en la mensojn de la infanoj la unuecon kaj kontinuecon de la monda civilizacio.” Ili precipe akcentis la bezonon emfazi la kontribuon de la azia popolo al la mondocivilizacio; pli vi-

## KOMUNIKOJ DE LA LIBRO-SERVOJ

	gld.	fr.
<i>La Princo kaj Betty (Wodehouse)</i>	1.20	15.—
<i>La Tempo-maŝino (Wells)</i>	1.20	15.—
<i>Brulanta Sekreto (Zweig)</i>	2.40	30.—
<i>La Virineto en Bluo (Stuttard)</i>	2.40	30.—
<i>La Okuloj de la eterna Frato (Zweig)</i>	1.35	20.—
<i>Infanoj de Betlehem (Lagerlöf)</i>	0.60	9.—
<i>Ferio kun la morto (Lindquist)</i>	2.25	30.—
<i>Esperanto por infanoj (Solomon)</i>	1 10	17.—
<i>D-ro Dornier (Egerup)</i>	4.—	60.—
<i>Deklaracio (Ariŝima)</i>	1.50	24.—
<i>El la Camera Obscura (Hildebrand)</i>	0.75	12.—
<i>Batalo de l’Vivo (Dickens)</i>	bind. 3.50	52.—
<i>La Alia Pasinteco (Bulthuis)</i>	5.—	80.—
<i>Akbar (Limburg Brouwer)</i>	3.50	56.—
<i>Judoj sen Mono (Gold)</i>	5.—	75.—
<i>Tartarin de Taraskono (Daudet)</i>	6.60	99.—
<i>Peer Gynt (Ibsen)</i>	8.—	100.—
<i>La Internacia Lingvo (Lapenna)</i>	5.75	73.—
<i>insignoj:</i>		
<i>Verda stelo kun blanka foto 8 mm.</i>	0.65	10.—
” ” ” ” ” ” 13 mm.	0.75	13.—
<i>Verda stelo kun blanka randto 15 mm.</i>	0.75	13.—
<i>Flaginsigno (Esp.-Ned. flagoj)</i>	1.10	—
” (Esp.-Flandra leono)		15.—

*La 8 mm insigno estas nur kun pinglo, la aliaj kun pinglo, broĉo aŭ butono ĉi-vereblaj. La flaginsigno kun broĉo aŭ butono.*

### Mendu ĉe:

Libro-Servo LEEN, Pythagorasstraat 122, Amsterdam  
Flandra Esperanto Institu, Blankenbergse Steenweg 72, Brugge  
Belga Esperanto-Instituto, Oostenstr. 26, Antwerpen

vecan kaj realan prezenton de la azia vivkonceptado precipe rilate familion, nutraĵon, edukadon, arhitekturon, literaturon k.s.

*La nukleaj testoj ne havis influon je la vetero.*

Antaŭ nelonge la Plenumkomitato de la Monda Organizaĵo de Meteorologio informis, ke ne ekzistas kaŭzoj por konkludi ke la nukleaj eksplodoj havis ian ajn rimarkindan efikon je la vetero. La Komitato decidis plue observi la aferon surbaze de eventualaj novaj informoj, kiuj povus alveni, sed ĝi decidis haltigi la ĝisnunan esploradon rilate tiun demandon.

La Komitato ankaŭ anoncis la starigon de grupo de sciencistoj, kiuj studos la meteorologiajn aspektojn de la uzo de atoma energio por pacaj celoj, kun speciala atento al la moviĝo de radioaktivaj produktoj en la atmosfero.

*Sovet-Unio kaj Nederlando interŝanĝas majstroverkojn.*

La direktoro de la Nacia Muzeo de Nederlando ĵus anoncis, ke Sovet-Unio sendos pentraĵojn al la ekspozicioj, kiuj en julio okazos en Amsterdam kaj Rotterdam por festi la 350-an datrevenon de la naskiĝo de Rembrandt.

*Esperanto en la publikaĵoj de UNESKO.*

En diversaj publikaĵoj de UNESKO pli kaj pli estas menciataj diversaj kulturaj aktivecoj ligitaj al la Internacia Lingvo. La bonega revuo Courier, majo 1956, presigis informon pri la publikigo de tiu ĉi Esperanta bulteno sub la titolo „Novajoj from UNESKO”. La bulteno „UNESCO-Features”, kiu estas sendata al miloj da gazetoj tra la mondo, alportis en sia numero 184 informon pri medicina revuo publikigata en Esperanto. La monata bulteno de scienca dokumentado kaj terminologio (Monthly Bulletin on Scientific Documentation and Terminology) de majo 1956 alportas sur la lasta paĝo tekston en Esperanto sub la titolo „Elementoj preter la Uranio”. La n-ro 176 de UNESCO-Features informas sub la titolo „Svedaj esperantistoj esprimas solidarecon kun la UNESKO-kampanjo kontraŭ antaŭjuĝoj” pri la Rezolucio unuanime akceptita de la Esperanto-Societo en Karlskoga. En ĝi estas akcentita la komuna celo de UNESKO kaj de la Esperanto-organizaĵoj unuigi la homojn de ĉiuj rasoj.

„Laŭ UNESCO-Features kaj UEA-Infoservo”.